


# ESPERANTO JUNULARO

## CIRKULERO DE SUDBOHEMIA ESPERANTISTA JUNULARO



### Zlatá koruna (Ora Krono)

En mezo de freŝa verdaĵo kaj de belaj arbaroj, en ĉirkaŭaĵo de malgrandaj vilaĝaj dometoj troviĝas restaĵoj de iam belega monaĥejo de cistercianoj "Zlatá koruna", fondita de Přemysl Otakar II en jaro 1263. Ĝis nun estas forsavita antaŭ plena ruiniĝo nur ĉefa preĝejo de Mario la Virgulino, kies portalo montras nia bildo. En ĝi estas la sama pentraĵo, kiu staras en Krumlov (Madono kun Jezueto sur ora fundamento).

Originalo de tiu bildo estis ne la lasta tempo forprenita kaj anstataŭas ĝin tre bone artefarita kopio.

Sed tio, kio restis el la monaĥejo pravas pri iam estinta beleco kaj riĉeco, per ĝi estis ebligataj oravidaj armeoj de Germanoj (en la jaro 1278) kolevigataj armeoj de Taboritoj (en jaro 1420) kaj armeoj en 30-jara milito. Kie restis el la monaĥejo, estis forveturigita en jaro 1785, kiam estis la monaĥejo nuligita. Pri ĝia juvelaro oni multe skribis en arkivo de kastelo Český Krumlov.

ooo

Raporto pri regiona konferenco de Esperanto-Junularo en Ĉ. Budějovice, okazinta la 17an kaj 18an de Majo 1952 en klubejo, Rooseweltstrato 447.

XX

Jam antaŭtagmeze sabate alvenadis en Ĉ. Budějovice, metropolon de sudbohemujo, multaj interesuloj de la konferenco; je la 11.27 horo forveturis 18-persona societo al Krumlov pro trarigardi ĝin, ĉiuj partoprenantoj de ĉi tiu ekskurso vizitis la tiean kastelon, pri kies konstruo estis raporto en la 4a numero de nia cirkulero; post trarigardo de la urbo ili veturis reen en Ĉ. Budějovice, kie sekvis trarigardo de urbo Ĉ. Budějovice.

Je la 20a horo komencis interkonatiĝa vespero, kiun malfermis gvidanto de junularo en Ĉ. Budějovice, s-ano Vlk Miloslav per la bonveno de ĉiuj ĉeestantoj; je nomo de la klubo salutis ilin s-ano inĝ. Krajíc Ladislav. La propran programon komencis junularo per la muzika signalo du Radia stacio de Ĉ. Budějovice "Tra putina pordego"; poste ludis anoj de junularo Vlk M. kaj Lipertová Eva, ludon de Averĉenko "Forta karaktero". Sekvantan punkton de programo plenumis la plej junaj

s-anoj de nia klubo Ernest Fr. kaj Kovář Fr. per ludeto "Edziĝo". Poste la junularo kantis kantaĵon "Svati mi jam pretas" (K Budějovicům cesta) ĉeĥe kaj esperante, laŭ traduko de T. Pumr.

Sekvis libera amuzo kaj dancado, al kiu ludis orkestro de Plialta industria lernejo en Č. Budějovice, sub gvido de s-ro instruisto Hobzík.

Dimanĉe komencis je la 8a horo laborkunveno.

Malfermis ĝin s-ano Vlk M., kaj sekvis himno esperantista. Pri hodiaŭa situacio en nia movado; inter alia li diris: "Vi ĉiuj konas hodiaŭan situacion de nia movado ĉe ni; la traktado pri nia plua ekzistado kun la partio progresas; estas riproĉata al ni kosmopolitismo, sed tio estas eraro; ni proklamante kaj disvastigante la lingvon, ni proklamas egalecon kaj fratecon inter la nacioj. Ke ni ne estas veraj patriotoj? Ni ne parolus pri patriotismo, sed ni ĝin agas; vidu la informojn, kiujn donas la esperantistoj al la mondo, la informoj pri la klopodado de nia popolo; la korespondado estas ties dokumento. De iu grava instanco estis dirita: "Vi faris multe da laboro kaj vi povos fari pli multe, se vi estus helpantaj al ni". Kaj kia vojo restas al ni? La vojo de konvikado; la situacio hodiaŭ tenas niaj cirkuleroj, en multaj urbo, en viaj viglaj grupoj, (29 grupoj kaj 7 cirkuleroj). Por pli profundigi viajn konojn de nia lingvo, sendu viajn anojn al somera lernejo en Rožnov kaj en Doksy; tio estas la unua punkto de la devo de ĉiu homo, kiu volas nomiĝi sin "Esperantisto." Estas necese ellerni la lingvon tiom, ke ni povu paroli ĝin kiel la gepatran lingvon; tiel ni pruvos, ke ni povas ekzisti, ke nia lingvo estas parolebla, ke foriĝu la "eternaj komencantoj" el niaj vicoj".

S-ano ing. Krajíc L. parolis pri interrilato de la junaj kaj maljunaj anoj en niaj kluboj; li diris: "Estas necesa pri tio paroli, ĉar ĝi estas tro grava afero. En multaj lokoj estas junularaj fakoj; do la junularo devas labori kun maljunaj de la klubo; la junularo bone hodiaŭ laboras kaj la nia batalo por la junularo estas batalo pri la estonteco de la movado, la junularo estas nia estonteco; la junularo - tio estas progreso, la junularo havas ĝiajn mankojn, sed eĉ la maljunaj ilin havas. Do estas necesa ambaŭflanka konsilado; do konkordo, harmonio al la celo".

Poste koncize parolis s-ano Vyhlička V., estro de la junularo en ČSR kaj poste oni diskutis pri diversaj laŭ sekvonta programo:

1. Kiel laboras junularo?

a/ aparte aŭ en klubo?

b/ kiel ĝi kunvanadas? Ĉiusemajne?

c/ kiel ili aranĝas programojn?

d/ kiel ili aranĝas lingvon perfektigon?

2. Kiel junularo propagandas kaj gajnas novajn adeptojn?

a/ ĉu per persona propagando?

b/ ĉu en societoj per afiŝoj?

3. Kiel estas gvidantaj kunvenoj?

a/ ĉu de junularo aŭ pli aĝaj samideanoj?

b/ ĉu en klubo ĉiu lernejo?

- c/ ĉu instruistoj estas esperantistoj?
- d/ kiel grandan kotizon vi havas en kursoj?
- e/ ĉu vi pagas al instruistaj?
- f/ kiel longe daŭras la kursoj?

La diskutadon gvidis Vlk M. kun estinta estro de nia junularo Novotný Vl., kiu ricevis permesilon, viziti nian konferencion.

Por la ĉeestantoj el Čermná parolis s-ano Štěpánek. Li diris, ke ili nun fervore klopodas havigi propran ejon por kunvenoj; ĝi estas ia ligna domo, sed la instancoj ne volas permesi al ili tion. Ili faris bonan laboron; kelkaj samideaninoj, kiuj estis je la kongreso en Pardubice, komencantinoj, sufiĉe bone parolis; ili havas novajn geinteresulojn pri nia lingvo.

Pri la agado de junularo en Třebíč parolis s-ano Gottfried J. Ili ĉiam malfermas per la kanto, poste ili diskutas pri la laboroj kaj ekskursoj. (La tutan raporton vi trovos en la 5a numero de "Fratego")

Por junularo Pardubice parolis s-ano Stecher J. Ili finis kursojn, kiuj tre fortigis ilian junularon, ĉar multaj kursanoj restis al ili. Ili havas ankaŭ malfacilaĵojn kun la ejo.

Pri agado de junularo Hradec Králové parolis Žluva Mil., kiu skizis laboron en lia distrikto kaj montris al diversaj malhelpaĵoj.

Ĉeestis ankaŭ s-ano Drápal Miroslav, kiu parolis pri estonta dragista rondeto en lia laborloko. Li donis proponon, kiu helpas al nia laboro por la estonta rondeto per propaganda materialo, libroj, ktp. Ili rekompencos sin per subteno de cirkulero minimume por Kčs 200,-.

Prezis vorton s-ano Blažek Jan kaj parolis pri movado en Strakonice; ili havas 30 anojn (15 vikle vizitas kunvenojn); al ili mankas junularo: oni diskutis la aferon kaj junularo de Č. Budějovice promesis helpial ili per ia prelego kaj per diversa materialo.

Je la fino oni diskutis pri la lingva kapableco de la anoj de junularo kaj s-ano Hromada plendis, ke ili parolis ĉeĉe dum la konferenco: la rezulto de la diskutado estis la propono de ia konkurso inter la junularaj grupoj koncernanta de la lingva flanko de anoj; s-ano Vyhlídka promesis prilabori tutan aferon; eĉ oni parolis pri tio, ke ni pli bone lernu kantojn (Himnon!!!)

S-ano Hromada taksis kunvenon; ing. Krajíc L, kaj Vlk M. dankis al ĉiuj por la ĉeesto. La laborkunsido estis fermita per la himno de Junularo je la 11a horo.

Je la 13a horo la ĉeestantoj veturis al Hluboká – Zámostí, kie ili trarigardis belegan kastelon. De Hluboká poste disveturadis la partoprenantoj de nia konferenco.

Al konferenco partoprenis anoj kaj delegitoj en jenaj urboj:

Praha 3, Hradec Králové 3, Pardubice 3, Třebíč 1, Most 1, Šumbark 1, Hranice 1, Lanžhot 1, Výprachtice 1, Horní Čermná 2, Dolní Čermná 9, Strakonice 2.

Ni instigas la partoprenantojn, ke ili kritiku nian laborkonferencon en iliaj cirkuleroj, sed modere; ĝi estas nia unua pli granda enterpreno kaj ni ne havis spertojn.

Vivu Esperanto!!!!

## Atentigo.

La Deventera JU-KO grupo (Junular-komununo) organizos letermatenon la 6an de Julio 1952. Bonvolu sendi grandamase leterojn, il. pk., gazetojn, broŝurojn ktp. pri Ĉeĥoslovakio; se eblos, ni aranĝos ekspozicion per la alvenintaĵoj. Skribu al: Ab Kraaijenzank, Tjccenerstraat 62, Deventer, Nederlando.

=====

Al ĉiuj ges-anoj, kiuj anoncis sin al nia Junulara konferenco sed ne venis, timante ke ili ne ricevos tranoktejon, ni post ilia anonco jam ne respondis, ni donas informon, ke ni por ĉiuj interesuloj prizorgis loĝejon, ĉar iliaj deziroj estis por ni ordonoj, tial ni jam ne respondis, esperante, ke ĉiuj komprenos ke iliaj deziroj estis plenumitaj; tio decido validas ĉiam por ĉiuj.

XXXXXXXXXX

Ni petas ĉiujn anojn de nia Junulara rondeto, ke ili vizitu regule niajn kunvenojn, okazantaj en klubejo Rooseweltstrato 447 ĉiuĵaŭde je la 19a horo ankaŭ klubanoj estas petataj, viziti kluban kunveren la sama tago en la sama ejo je la 20a horo; al ĉiuj, kiuj ne montras intereson por nia laboro, ni plu ne povus sendadi gazeton.

En hodiaŭa numero ni devis forlasi multajn anoncetojn kaj rubrikon, ĉar nia raporto pri konferenco forprenis multe da loko kaj al ni mankas papero; en venonta numero aperos ĉiuj forlasitaj artikoloj.

XXXXXXXXXX

Grupoj aŭ kluboj estas petataj, sendi se eble plej baldaŭ al "Esperanta rondeto de dragistoj" en Hranice, diversajn propagandilojn al adreso: Drápal Miroslav, Hranice K S.Ú, Skalka. (Vidu raporton!)

XXXXXXXXXXXXXX

### Alvenintaj subtenoj:

K r e j ĉ o v á Květa, Kamenný Újezd	Kčs	50,---
M i c h a l o v á Marie, Mokrý Lom	"	50.--
K o m z á k o v á Lída, Tábor	"	50,--
H o r á k Bohumil, Buk u Přerova	"	50,--
Z a n á š k a Rudolf, Kopřivnice	"	40,-
JUDr B o r s k ý, Č. Budějovice	"	20,--
Ing K r a j í c Ladislav, Č. Budějovice	"	20,--
Fervoja Esperanta Rondeto, Bohumín II.	"	70,--
Esperanto ZK ROH ČSD, Pardubice	"	50,--
D r á p a l Miroslav, Hranice	"	200,--
V a l j a n Andrej, Galanta	"	50,--
S v a ĉ i n a Fran, Lanžhot	"	50,--
Š i m e k Jakub, Č. Budějovice	"	30,--

Z á v o r k o v á Olga, Most	"	60,--
MrPh H o f f m a n n Ondrej, Lipt. Sv. Mikuláš	"	100,--
B u r i á n e k Čestmír, Včelná	"	50,--

Al ĉiuj tiuj malavaraj subtenantoj ni elkore dankas.

XXXXXXXXXXXXX

### Kato parolanta esperanton!

Strango, ĉu ne? - Venanto hejmen mi ekvidis katon sidantan, sur mia skribotablo.

Mi diris al ĝi: Ĉu vi ne volas foriri?

Tamen ĝi ne moviĝis. Donante al ĝi frapon, mi diris:  
Ĉu vi aŭdas? Mi-aŭdas, mi-aŭdas.

### P o r l i b r o - a n g u l e t o .

#### Legendo pri konvalo.

Iam vivis knabineto, bonkora, kvieta, servema; ŝi mortis dekdujara kaj estis prenita ĉielen; tie renkontis ŝin anĝeloj kaj kore salutis. Ŝi estis tre kontenta kaj ne pensis plu pri la tero, kie ŝi loĝis iam. Foje ŝin demandis anĝeleta: "Ĉu vi ne bedaŭras estintan vivadon sur la tero?" "Ho, tute ne!"

"Ĉu vi ne pensas pri via hejmo; ĉu vi ne bedaŭras la patrinon? Eksilentis la knabineto. Ŝi rememoris la patrinon kaj unufoje ekmalĝojiĝis; ŝi ekploris; ŝiaj larmoj, puraj kaj sinceraj, falis teren, ili aliformiĝis en aromajn floretojn de konvalo.

XXXXXXXXXXXXX

### Vera bonfarado"

Ne estas tiel grava malplenigi vian monujon kaj disŝuti la monerojn per plenaj manplatoj: ni neniam vidis, ke la mono igis ami iun.

Vi povus malfermi viajn kestojn; sed vi ne malfermos viajn korojn, la koro de aliaj restas ĉian fermitaj.

Vi devas fordoni vian tempon, viajn klopodojn, vian senton, vin mem.

Ĉar, kion ajn vi farus, oni sentas ĉiam, ke via mono ne estas vi mem.

La bonvolema atento efikas pli multe kaj estas efektive pli utila, ol ĉiuj donoj.

Kiom da malfeliĉuloj, da malsanuloj bezonas pli da konsolo, ol da almozo.

Ne donu nur almozon, donu vian koron, kiam vi bonfaradas.

Se la parolo ne eliras el nia koro.

Ĝi ne altiras alian koron kaj amon.

P l o s s Jos.

## Post laboro bonhumoro

"S-ro, Ĉu vi kredas al amo en unu momento?" demandas fraŭlino.

"Ne f-ino, al tio mi certe ne kredas" respondis li.

"Nu, tio ne estas tiel grava," diris f-ino; "ni vidos nin morgaŭ denove."

XXXXXXXX

"Paĉjo, ĉu mi povas ankoraŭ preni unu kukon?" demandis malgranda Joĉjo.

"Demandu la patrineton" respondis patro.

"Ĉu vi ne povas unufoje ion mem ordoni?" demandis Peĉjo.

XXXXXX

"Manjo, ĉu profesoro en nro 15 jam matenmanĝis?"

"Mi ne povas memori," respondis Manjo.

"Do demandu profesoron!"

"Tion mi jam faris, sed li ankaŭ ne scias, ĉu li jam matenmanĝis."

XXXXXXXXXX

La filo edziĝas kaj la patro donas al li kelkajn direktivojn; faru la samon kiel mi, kiam mi edziĝis; mi kontraktis kun mia edzino, ke en gravaj aferoj decidus ĉiam mi kaj en malgravaj aferoj ŝi.

"Kaj helpis tio?" demandas la filo.

"Certe," respondas la patro, "sed gravaj aferoj ĝis nun ne aperis."

---

Eldonas senpage, laŭbezone ZK ROH poŝtovních zaměstnanců, Ĉ. Budějovice, Esperanto-sekcio. Redaktas komitato de ESPERANTO-JUNULARO, Ĉ. Budějovice. Korespondadreso: ESPERANTO-JUNULARO, Šumavská 250, České Budějovice.